Aruŝo vendredon, la 9-an de aŭgusto 2024 numero 6

# La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

**Kontribuu por ke ĉiuj libroj kaj varoj de la kongresa Libroservo restu por vi – kaj por Afriko!**

Karaj kongresanoj, pro diversaj transportaj defioj, la kongresa Libroservo de la historia UK en Afriko estis pretigita danke al multe da klopodo kaj kunlaboro. Laŭ siaj ebloj kolegoj persone kunportis librojn kaj varojn – kaj UEA alvokas vin kontribui por ke nenio devu reveni.

Krom akiri la Libroservajn varojn por vi kaj konatoj en via lando, vi ankaŭ povas donacakiri por multe da afrikanoj, kiuj povas resti kun la libroj kaj aliaj materialoj de la Libroservo!

Eĉ se relative malgranda, la nuna kongresa Libroservo proponas interesajn verkojn, belajn T-ĉemizojn, mojosajn diskojn kaj aliajn valoraĵojn! UEA kun espero atendas, ke vi kunlaboru, aĉetante kelkajn el tiuj varoj por vi kaj por donaci al afrikaj geamikoj.

Al la karaj geamikoj, kiuj ĝis nun jam faris ĉi-komplezon, UEA sincere dankas kaj invitas la aliajn bv. ne forgesi, ke hodiaŭ ankoraŭ eblas fari ĉi-belan bonvolemon.

Vi povos rekte aĉeti kaj donaci al iu ajn, aĉeti kaj lasi, ke UEA disdonu aŭ dediĉi iom da mono, ke la organizantoj mem kune kun la ricevontoj decidu kiel disdoni la diversajn varojn.

## Perdo de objekto: ĉies helpo petatas!

Hieraŭ 8.8.2024 je la 13-a proksime de la manĝejo estis perdita brunkolora monujo kun nigraj kvardretoj sur ĝi. En la koncerna monujo estas 2 bankkartoj, identiga karto, stirilo en la nomo de Adjévi Adjé, krom kelkaj malgrandaj monbiletoj en XOF, Cedis kaj USD kaj aliaj dokumentoj. Se iu trovis ĝin aŭ havas informojn pri ĝi, oni bonvolu kontakti per +255672786111 aŭ iri lasi la trovitan objekton ĉe la akceptejo.

Multajn antaŭdankojn pro la helpo kaj solidareco!

## Aŭtoraj duonhoroj hodiaŭ

**09.15-09.45:** Anna Lowenstein, *Čeliauskas*, prezento de sia traduko de la klasikaĵo de la afrika literaturo "Aferoj disfalas" (Things Fall Apart) de Chinua Achebe.

**10.00-10.30:** Jean de Dieu Kikako, *Čeliauskas*, Deklamado - poemoj

**11.00-11.30:** Marija Belošević, *Ferenczy*, prezento de la eldonoj de IKUE "Laudato si'" kaj "Laudate Deum".

## Konkursoj de IKUE

Prepare al la 75-a Kongreso de IKUE okazas du konkursoj kun la kongresa temo "Instruu nin preĝi". Rajtas partopreni ĉiuj esperantistoj. Ne maltrafu ilin! Limdato estas la 21-a de aŭgusto 2024. Pli da informoj estas haveblaj per *ikuekongreso@gmail.com* aŭ ĉe *https://eventaservo.org/e/d53a9b*.

**Marija Belošević**, KN 306

## Dankesprime…

LKK de la 109-a UK kaj Tanzania Esperanto-Asocio esprimas sinceran dankon al la Internacia Komunumo de Katedrala Paroĥo Sankta Francisko de la Katolika Ĉefdiocezo Xi'an en Ĉinio pro la malavaraj mon- kaj materialdonacoj ricevitaj pere de la pastro Stefano Chen. Tiuj ĉi subtenoj ebligos al ni plifortigi niajn agadojn, realigi projektojn ktp. Ili estas esencaj por ni kaj helpos al ni plureklami Esperanton en Tanzanio.

Refoje elkoran dankon al pastro Stephano kaj la Tuta Komunumo de la Katedrala Paroĥo Sankta Francisko pro la donacoj cele al la progresigo de Esperanto en Tanzanio. Dio Eternulo gvidu vin en viaj noblaj celoj kaj atingoj. Benon al vi ĉiuj!

**Francis Gendo**

## Piedpilke: E-ista teamo 2-3 Lokanoj

Hieraŭ posttagmeze sur la urba stadiono de Aruŝo okazis la tradicia futbala matĉo inter la E-ista teamo kaj la surloka Veterana teamo. La unua periodo finiĝis per 2-1 favore al la E-ista teamo, sed dum la dua periodo la Veterana teamo superis per 2-0. La E-ista teamo ankoraŭ ĉi-jare denove malgajnis la UEA-trofeon.



## Virinoj aktivas...



Membroj kaj konsilantaranoj de la komisiono de Virina Agado. De maldekstre: Alexandrine (DR Kongo), Mirejo (Svislando), Arko (Ĉinio), Miora (Madagaskaro) kaj Anna (Britio).

Sukcese okazis la programero Virina Agado, ĵaŭdon, la 8-an de aŭgusto, de la 15.15 ĝis la 16.45 en la salono Hodler. Pli ol 70 kongresanoj ĉeestis.
La Virina kunsido komenciĝis per la parolado de la prezidanto de UEA, kiu emfazis la gravan rolon de virinoj en Esperanto-Movado, kaj certigis, ke nia movado bonvenigas virinojn, bonvenigas ĉefe junajn virinojn de ĉiuj ĝeneracioj, kiuj kunlaboras por reciproke subteni sin. Do, nia agado estas necesa en nia movado. D-ino Miora Raveloharison prezentis la 2-an Afrikan Kongreson de Virinoj (AKVo) kaj ĝian grandan signifon por afrikaj virinaj esperantistoj. D-ino GONG Xiaofeng (Arko), estraranino de UEA pri Virina Agado, prezentis unue la novan restarigitan komisionon de Virina Agado, ties strukturon kaj misiojn, nuntempajn kaj planatajn agadojn; kaj poste la elstarajn virinajn esperantistojn en diversaj kampoj historie. Anna Lowenstein raportis al ni pri fruaj virinaj agadoj en la E-movado kaj la gazeteton "Sekso kaj Egaleco" kiun ŝi fondis kaj redaktis. Mireille Grosjean gvidis demandojn kaj respondojn. Du junaj kantistinoj el Tanzanio, Victoria (KN 728) kaj Nicole (KN 800) kantis belan kanton kaj nia kunsido finiĝis per bela kantado kaj varma aplaŭdo de ĉiuj.
La estonteco apartenas ne nur al viroj sed ankaŭ al virinoj. Aliĝu al: *virina-agado@groups.io* aŭ skribu al: *virina.agado@esperanto.org*.

**GONG Xiaofeng (Arko)**, KN 43

## Afrikeca scienca programo

Hodiaŭ, vendrede, okazos la du lastaj prelegoj de Internacia Kongresa Universitato, samkiel la plimulto de la aliaj – pri temoj rilataj al Afriko, kaj de afrikaj prelegantoj. Bonorde okazis la 7 IKU-prelegoj kaj 3 prelegoj de Scienca Kafejo (SK). La kvara SK-prelego ne okazis pro miskompreno de la prelegantino. Kiel kutime, tri IKU-prelegoj havis daŭrigan AIS-prelegon: *Astrofiziko por Laikoj*, *Afrika Filozofio* kaj *Datado de Fosilioj en Afriko*, dum kiu ankaŭ okazis AIS-ekzameno. Ĉiuj partoprenintoj en la ekzamenoj ricevos atestojn, ĉu paperajn tuj post la fermo ĉe la UEA-budo, ĉu retajn.
La IKU-prelegojn sekvis inter dudek kaj sesepdek ĉeestaj aŭskultantoj, kaj tiuj de ĵaŭdo kaj vendredo estis ankaŭ hibridaj, kun spektantoj per Zoom. Ili eĉ starigis demandojn pri kiuj la preleganto respondis post la prelego.
Alia kulmino de la scienca programo estas la IKU-libro, kiu ĉi-jare havas ĉ. du cent paĝojn, 16 prelegotekstojn kaj resumojn eĉ en la svahila. La tanzania vicministro pri Turismo interesiĝis kaj ricevis ekzempleron post la malfermo, kaj multaj kongresanoj jam akiris ĝin en la Libroservo aŭ dum la IKU-prelegoj.
Plia faceto de la Esperantologia Konferenco, organizita de CED, okazis dum ĵaŭdo kun inter tridek kaj sesdek aŭskultantoj. Ĉiuj planitaj prelegoj krom unu realiĝis. Ĝia lasta ero estis publika diskuto pri la Afrika Esperanto-movado kaj agado. Enkondukis Adjévi Adjé kaj kontribuis Aleksandrine Omba, Elisee Byelongo, Amri Wandel nome de UEA kaj aliaj.

**Amri Wandel**



Orlando Raola prelegas pri radioaktiva datado de fosilioj, IKU-AIS 3. Fotis: A. Wandel

## Pola RetRadio pri la 109-a UK

Dum la tuta kongresa semajno red. Barbara Pietrzak el Pola RetRadio, Esperanto-Radio Varsovio: *www.pola-retradio.org* peris/as por la eksterkongresa publiko en siaj sonraportaj alrigardoj al la 109-a UK – informojn pri la pulsanta kongresa vivo. Ĉiuj elsendoj ekde 03.08.2024 estas/os aŭdeblaj ĉe la menciita adreso.
Ĝuu, reĝuu la kongresklimaton de la 1-a UK en Afriko kaj reagu al: retradio.esperanto@gmail.com.

# Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2024

Estis alljuĝitaj la agnoskoj (premioj kaj honoraj mencioj) de la 75-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK). Gvidis la BK-ceremonion en la 109-a Universala Kongreso de Esperanto Vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., surbaze de materialo preparita de la sekretario de la BK, Miguel Gutiérrez Adúriz, kun subteno de Francisco Javier Moleón, plurfoje premiita en la BK, kiu voĉlegis la mikronovelon gajnintan la unuan premion – premion Paula Adúriz – "Enamiĝinto", de Jorge Rafael Nogueras. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj la prezidanto de la BK, respektive Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández (kiu registris videon). Okaze de la 75-a eldono de la BK estis ricevitaj entute 110 verkaĵoj. La agnoskoj estis:

BRANĈO POEZIO
Juĝkomisiono: Krys Williams, István Ertl, Mao Zifu.
Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj [6 el Azio, 1 el Ameriko, 17 el Eŭropo]
La unua premio estas aljuĝita al "Litera turo" de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.
La dua premio estas aljuĝita al "Reveno" de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.
La tria premio estas aljuĝita al "Mia lasta vizito" de Benoît Philippe el Germanio.

BRANĈO PROZO
Juĝkomisiono: Trevor Steele, Julian Modest, Anina Stecay
Partoprenis 18 verkoj de 12 aŭtoroj el 8 landoj [2 el Azio, 2 el Ameriko, 14 el Eŭropo].
La unua premio estas aljuĝita al "Brodita tuketo" de Ewa Grochowska el Francio.
La dua premio estas aljuĝita al "Plano B" de Debra Hamel el Usono.
La tria premio estas aljuĝita al "Lia sekreto" de Cho Sung Ho el Koreio.

BRANĈO MIKRONOVELO
Juĝkomisiono: Trevor Steele, Nicola Ruggiero, Antonio Valén.
Partoprenis 35 verkoj de 16 aŭtoroj el 12 landoj [9 el Azio, 6 el Ameriko, 20 el Eŭropo].
La unua premio – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al "Enamiĝinto" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.
La dua premio estas aljuĝita al "Unuaj amrendevuoj" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.
La tria premio estas ne aljuĝita.
Honora mencio estas aljuĝita al "Ridetema soldato" de Yin Jiaxin el Ĉinio.

BRANĈO TEATRAĴO
Juĝkomisiono: Saša Pilipović, Georgo Handzlik, Alena Adler
Patroprenis 1 verko de 1 aŭtoro el 1 lando [1 el Eŭropo].
La unua premio estas ne aljuĝita.
La dua premio estas ne aljuĝita.
La tria premio estas aljuĝita al "La Krimulo kaj la Floro" de Raffaele Del Re el Italio.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO
Juĝkomisiono: Saša Pilipović, Georgo Handzlik, Alena Adler
Patroprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj [2 el Eŭropo].
La unua premio – premio María Cuevas – estas ne aljuĝita.
La dua premio estas. aljuĝita al "Nova fianĉino" de Ewa Barbara Grochowska el Francio.
La tria premio estas ne aljuĝita.

INFANLIBRO DE LA JARO
Juĝkomisiono: Ricardo Albert Reyna, Jeong-yeol Jang, Martin Markarian.
Partoprenis 14 infanlibroj de 6 eldonejoj el 6 landoj [1 el Ameriko, 13 el Eŭropo].
La premio "Infanlibro de la jaro" estas aljuĝita al la Eldonejo "Esperanto-Asocio de Britio", pro la verko "Doktoro Esperanto kaj la lingvo de Espero" de Mara Rockliff, ilustrita de Zosia Dzierżawska.

BRANĈO ESEO
Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.
Partoprenis 4 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj [1 el Ameriko, 1 el Azio, 2 el Eŭropo].
La unua premio - premio Luigi Minnaja - estas ne aljuĝita.
La dua premio estas ne aljuĝita.
La tria premio estas aljuĝita al "De drako al loongo: la malfacila tasko esperantigi ĉinajn vortojn" de Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo.

BRANĈO KANTOTEKSTO
Juĝkomisiono: Ankie van der Meer, Ĵak Le Puil, Flavio Fonseca
Partoprenis 12 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj [2 el Ameriko, 3 el Azio, 7 el Eŭropo].
La unua premio estas aljuĝita al "En la trajno de mil duboj" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.
La dua premio estas aljuĝita al "Liven Dek, diru jam!" de Jorge Rafael Nogueras el Usono.
La tria premio estas aljuĝita al "Lasta amo" de Ewa Barbara Grochowska el Francio.
Honora mencio estas aljuĝita al "Sen vi" de Virágh Ferenc el Germanio.
Honora mencio estas aljuĝita al "Inferaj inaj vivoj" de Serĝo Sir' el Francio.

**Miguel Gutiérrez Adúriz**
Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA



Fotis Elizabet Le Dru, KN 324

## Aŭkcio kun apartaj varoj

Kelkaj elstaraj objektoj donacitaj de la Libroservo de UEA kaj de individuaj esperantistoj atendas vin ĉe la Aŭkcio, kiu okazos hodiaŭ de la 15.30 ĝis la 16.30 en la salono Zamenhof. Inter ili estas ĉefe libroj, eĉ tre raraj eroj el la fruaj jaroj kaj diversaj Esperantaĵoj. Speciala aŭkciaĵo estos la kongresnumero 1 de la sekva 110-a Universala Kongreso en Brno, Ĉeĥio.
La sumo kolektita per la aŭkcio subtenos utilan celon, precipe al la Volontula Fondaĵo de UEA.
Jen okazo samtempe ĝui la spektaklon kaj antaŭenigi UEA kaj la Esperanto-movadon! La programeron gvidos ĉi-jare Michael Boris Mandirola.

## Venonta UK

Ĉi-vendrede, inter la 17.00 kaj 18.00 en la salono Zamenhof, okazos oficiala prezento pri venonta Universala Kongreso de Esperanto. Temos pri publika prezento de la 110-a UK, kiu okazos venontjare en Brno, Ĉeĥio. Venu ekscii diversajn detalojn pri la kongresejo, urbo kaj la lando, kie ĝi okazos! Venu eluzi la okazon por demandi la ontajn LKK-anojn, kio interesas vin.

## Afrika kunveno

Kunveno pri la Afrika agado kaj komisiono de UEA ankaŭ ĉi-jare en Aruŝo denove okazos. Ĝi disvolviĝos ĉi-posttagmeze de la 14.15 ĝis la 15.45 en la salono Lala. Ĉiuj interesatoj estas bonvenaj partopreni kaj kontribui per siaj ideoj. Estos prezentitaj agadoj en la kontinento kaj planoj. La programero estos sub la gvido de Patrick Manirakiza.

## Nuligita koncerto

La hodiaŭa planita koncerto de Samba Faye ne okazos – la senegala artisto ne ricevis vizon por alvojaĝi Arusôn.

## Uzu la servon de Eventa Servo

Ĉu vi havas poŝtelefonon aŭ komputilon? Uzu la senpagan servon Eventa Servo de UEA por:
- trovi E-eventon aŭ renkontiĝon ie ajn
- anonci eventojn, renkontiĝojn ktp.

Vizitu *https://eventaservo.org* aŭ skanu la QR-kodon ĉi-apudan.
Kiam vi anoncas eventon (renkontiĝon, feston, kurson ktp.) ĉiuj povas tuj vidi kio okazas, kiam kaj kie. Kiel iri al la evento? Vi aŭtomate vidas mapon kun la vojo por iri piede, buse aŭ veturile je la ĝusta loko. Vi ankaŭ povas indiki: *Mi interesiĝas*. Tiel vi povas sciigi pri via intenco partopreni kaj, se ne estas sufiĉe da interesataj personoj, la organizanto povas nuligi la eventon kaj vi scios tion aŭtomate. En Eventa Servo ĉiam eblas facile trovi plej aktualajn informoin pri eventoj. Post la evento vi povas aldoni resumon aŭ foton por viaj arkivoj kaj jarraportoj.
Ĉiuj estas invititaj, precipe afrikaj kaj aziaj geamikoj uzi ĉi tiun servon de UEA pli ofte, ec por malgrandaj lokaj renkontiĝoj – tiel ĝi tutmondiĝos plu!
Provu la retejon, kaj, se vi havas demando(j)n, venu al la interaktiva prezento ĉi-vendrede je la 16.00 en la salono Hodler.
Vi ankaŭ povas sendi mesaĝon al Yves Nevelsteen, la ĉefhelpanto de Eventa Servo per retpoŝto *yves.nevelsteen@gmail.com* aŭ Telegram https://t.me/yvesnev. Li de Belgio faciligas la uzadon de nia retejo https://eventaservo.org.

**Eriko Nemes** KN244

# Kongresa kanto

*Lumiĝas la tago la 3-an de aŭgusto*
*La suno multe brilas kiel neniam okazis*
*Ĉar la geesperantistoj de multaj landoj estas ĉi tie.*
*Venu, partoprenu en la Tanzania Kongreso*
*Ni interŝanĝu kune pri diversaj temoj,*
*Ankaŭ vi povas ĝui la plej belajn pejzaĵojn de Arusô.*
*UK, UK*
*Universala Kongreso de Esperanto*
*UK, UK*
*En Tanzanio jar' 2024*
*Niaj ideoj estas la fortoj kaj la spiritbataloj*
*Niaj sentoj estas la paco kaj la harmonio*
*Ĉar la flago de l'espero, nia kulturo kaj esprimoj*
*Restu ĉiam en vi.*
*La zamenhofa instruo donis al ni ĉiuj*
*La eblecon disvastigi la internacian lingvon*
*Kiu ne mortos, sed plu vivos inter la popola mond'*

*UK, UK*
*Universala Kongreso de Esperanto*
*UK, UK*
*En Tanzanio jar' du mil du dek kvar*

*Venu, venu, venu, partoprenu*
*Bonvenon al Arusô geesperantistoj*
*Venu, venu, venu renkontiĝu,*
*Esperanto ĉiam estos inter ni.*
*Venu, venu, venu, partoprenu*
*Bonvenon al Tanzanio geesperantistoj*
*Venu, venu, venu renkontiĝu,*
*Esperanto estas bona ideo.*
*UK, UK*
*Universala Kongreso de Esperanto*
*UK, UK*
*En Tanzanio jar' du mil dudek kvar.*

**Aŭtoro, kantisto kaj muzikisto**
Inĝ. Daimi Doval Delsa (Kubo)

La videaĵo de ĉi tiu kanto spekteblas ĉe: *https://mallonge.net/1f6*